

Porpacaj klopodoj.  
Prof. d-ro Jar. Kallab.

En la lastaj monatoj de l' milito kaj en la unuaj postmilitaj monatoj ŝajnis, ke la mondmilito signifis progreson almenaŭ en unu direkto. Nome en tiu, ke ĝi montris al ĉiuj popoloj la teruron kaj sensencon de batalado tiel klare kaj plastike, ke estonte neniu plu kuraĝos agiti por nova milito.

La ŝtatoj kaj popoloj sange sin reciproke kontraŭbatalantaj fidis pli al perforto ol al rajto. Ilian lokon estis okuponta asocio de demokratiaj popoloj, demokratiaj ne nur interne de l'ŝtato, sed ankaŭ en siaj reciprokaj interrilatoj. . . de popoloj, reciproke sin rekonantaj kaj estimantaj, de popoloj, kiuj ordigus diferencojn de siaj interesoj sur paca vojo de regnantoj, sed ne per sanga glavo de perfortuloj.

Jam ĉe la pac-intertraktadoj montriĝis, bedaŭrinde, ke la idealo de jura sekurigo de l'paco per kreo de superŝtata institucio, kiu la pacon garantius, kaj se necese eĉ eldevigus, estas pli malproksime ol ni esperis. La kaŭzo ne radikas en tio, ke la porpacaj klopodoj montriĝus eraraj aŭ neefektivigeblaj, kontraŭe, ĝi radikas en tio, ke ni, blinde kredante al mirakloj, opiniis, ke jura institucio, kia la Ligo de Nacioj, kapablas per mirakla forto garantii al ni la pacon, eĉ se ni mem ne zorgos pri ĝia sekurigo. La solvon de l' pac-problemo, la efektivigon de l'porpacaj klopodoj ni ne devas serĉi nur en Ĝenevo, ĉar Ĝenevo povas esti nur la ekstera signo por la fakto, ke ni sukcesis efektivigi la klopodojn, solvi la problemon interne de la unuopaj popoloj, ja eĉ interene de ĉiu el ni. La pacproblemo ne estas unuavice demando de jura rutino, demando pri pli-malpli konvena redakto de iu kontrakto, ĝi estas unuavice problemo morala. La plej perfekta jura institucio ne povas garantii al ni daŭran pacon, se la homoj ne estas preparitaj por la paco en sia pensado, sentado kaj volado. Kontraŭe, se ni atingos la moralan altecon, sur kiu la homoj estas maturaj por la paco, evoluos iom post iom eĉ malpli perfekta institucio al institucio ĉiam pli perfekta, bone servanta al praktikaj bezonoj. Tiel esperis ankaŭ la aŭtoroj de l' Kontrakto.

Kiu do estas la esenco de l' morala inklino, kiun ni devas kulturi en ĉiu regnano, en ĉiu popolo, se ni volas havi sekurigitan pacon? Ŝajnas al mi, ke en tiu ĉi punkto regas ankoraŭ multe da konfuzo, kiel en la kapoj de tiuj, kiuj kontraŭstaras la porpacajn klopodojn, tiel en la kapoj de l'sinceraj pacifistoj. Mi opinias, ke la ĉefa fonto de tiu ĉi konfuzo estas la identigo de perforto kun forto, de l'paco kun malaktiveco. Montrante la porpacajn klopodojn kiel malon de emoj perforte efektivigi egoistajn dezirojn de individuoj, de ĝiaj grupoj, de unuopaj popoloj, ni akcentas, ke ni malaprobas la uzon de forto ĉe efektivigado de egoistaj klopodoj. Ni volas atingi tian juran staton, kiu tiel akordigus la malsamajn klopodojn, ke ili garantius la plej perfektan evoluon de ĉiuj popoloj, de ĉiuj individuoj kaj grupoj. Ni malaprobas la perforton ne tial, ĉar oni uzas ĉe ĝi forton. Ni malaprobas ĝin tial, ĉar ĝi estas misuzo de potenco donita al homo. Kaj ni defendas la pacon ne tial, ĉar ĝi garantias al ni trankvilon, sed, ĉar ni volas, ke la kreanta maltrankvilo en ni manifestiĝu sur vojoj, sur kiuj ĝi utilis al la tuto.

Se la paco signifus trankvilon, malagemon, la militanoj estus pravaj asertante, ke militoj estos tiel longe, kiel longe vivos la homaro. Ĉar trankvilo en senco de malagemo alportas nur morton. Kiel longe la homo aŭ popolo vivas, li sekvas siajn celojn kaj serĉas rimedojn, kiel ilin efektivigi kaj kiel forigi malhelpaĵojn starantaj sur la vojo. Nur fatalisto povas kredi la eraran devizon de kelkaj ekstremaj pacifistoj, ke ni ne kontraŭstaru la malbonon. Ĉar, se ni ne kontraŭstaros la malbonon, kiu do igos venki la bonon? Nur homoj povas ja efektivigi la bonon. La pacifistoj riproĉas la militanojn ne tial, ĉar ili klopodas estigi tiajn kondiĉojn, kiuj ebligas al homo plej efike defendi siajn aspirojn, sed tial, ĉar ili faras el la forto - kiu povas servi al la bono same kiel al la malbono - idealon, do ion, kio havas ĉiam pozitivan valoron. Per niaj porpacaj klopodoj ni do ne postulas, ke malaperu el la mondo forto kaj potenco, braveco kaj oferemo, ke malaperu militista kamaradeco inter tiuj, kiuj defendas komunan aferon. Ni ne postulas, ke malaperu la ĝojo fontanta el venko kaj la honto sekvanta malvenkon, resume, ni ne postulas, ke malaperu el la mondo tiuj militistaj virtoj, kiujn la militanoj scipovas tiel alloge priskribi, riproĉante al la pacifistoj ilian

malrespekton rilate tiujn ĉi virtojn. Tute male, per niaj porpacaj klopodoj ni celas, ke tiuj ĉi virtoj manifestiĝu ne sole de tempo al tempo nur per heroaj eksplodoj, sed ke ili fariĝu daŭra faktoro de l'vivo. La homo devas esti kuraĝa ne nur, kiam li staras kun armilo en la mano kontraŭ malamiko, sed ankaŭ, kiam li staras kun sia klereco kontraŭ malklereco, kun siaj iloj kontraŭ la al la homo malamika naturo, kun sia bonvolo kontraŭ malbonvolo. Oferemon postulas ne nur militaj entreprenoj, ĝi necesas ankaŭ en ĉiutaga vivo; komuna sorto kunligas nin ne nur, kiam ni staras ŝultron ĉe ŝultro en tranĉeo, sed ankaŭ, kiam ni laboras je komuna tasko. Estas honto, se ni kulpas pri malvenko, ĉu en batalo kun armiloj, ĉu en iu ajn alia lukto.

La porpacaj klopodoj kaj klopodoj kontraŭaj diferenciĝas en tio, kvazaŭ la porpacaj klopodoj malakcelus virajn virtojn kaj la klopodoj pormilitaj ilin akcelus. Ili diferenciĝas en tio, ke la virtoj tiel laŭdegataj de l'militanoj ne estas virtoj ĉiam, sed nur tiel longe, tial kaj tiam, kiel longe ĉar kaj kiam ili servas al la bono.

Se ili servas al egoistaj klopodoj, al malbono, tiam ŝanĝiĝas braveco en obstino, oferemo en subteno de malbono, honto pro malvenko en kontraŭstaro al ekkonita vero.

Por paco necesas do morala forto almenaŭ en sama grado kiel por milito. La sola diferenco estas en tio, por kio ni uzas nian forton. Tiurilate la porpacaj klopodoj akcentas jen kion ni ne havas alian montrilon, kiu al ni montras, ĉu niaj fortoj servas al paco aŭ perforto, ol la celon, kiun ni sekvas. Ni scias, ke ne nur la vivo de individuo, sed ankaŭ la ekzistado de homaj grupoj, de partioj, de klasoj, de popoloj kaj de religioj estas limigitaj kaj kondiĉaj. Ne povas do esti bono tie, se ni metas la interesojn de individuo aŭ de unuopaj grupoj, ja eĉ de unuopaj popoloj antaŭ la interesoj de l' homaro. Oni ne atingis jam la celon de sia klopodado por bono, se oni scipovas submeti siajn interesojn al interesoj de l'klaso, aŭ konfeso, aŭ popolo, kies ano oni estas. La klasa aŭ popola egoismo povas ja esti same fonto de malbono por la homaro kaj per tio malrekte ankaŭ por mia propra klaso kaj popolo, kiel la egoismo de individuo.

Jen la radiko de ĝisnunaj malsukcesoj de porpacaj klopodoj speciale de la Ligo de Nacioj. Ni ne sufiĉe klare konsciiĝis, ke la porpacaj klopodoj postulas la saman kuraĝon, la saman oferemon kaj la saman personan bravecon, kiel la klopodoj pormilitaj. Pro egoismo la popoloj evitas preni sur sin kunrespondecon pri la endanĝerigo de l'mondpaco per egoistaj klopodoj de unuopaj popoloj. Se ili konsciiĝus, ke ili pentu-pagos sian sintenon per kelkoblaĵaj braveco kaj oferoj je vivoj kaj havaĵo, kiujn necesigas la subpremo de tiuj ĉi movadoj en ilia ĝermo . . . vere, la solvo de nesolvitaj problemoj ne farus al la Ligo de Nacioj tiom da malfacilaĵoj.

Sed necesas ankaŭ konsciiĝi, ke la vojo de individua egoismo al egoismo klasa aŭ popola povas esti same progreso kiel malprogreso. Ĝi estas progreso, se la klaso aŭ popolo klopodas servi al la homaro. Ĝi estas malprogreso, paŝo returne al bestialeco, se oni, pretekstante servi al klaso aŭ popolo, ne bridas tiujn egoistajn pasiojn, per kiuj, sur la nuntempa kulturenivelo distingiĝas nur krimuloj.

Tradukis  
Th. Kilián , 7. 11. 34,